



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

ANTAŬ 140 JAROJ NASKIĜIS ZAMENHOF

+++++

La jaro 1999 havas grandan gravecon por la esperantistoj de la tuta mondo. Antaŭ 140 jaroj, ja en 1859, naskiĝis en Byalistok Ludoviko-Lazaro Zamenhof, kiu en 1887 inventis la internacian lingvon kiun ni praktikas.

Kiu kredus tiuepoke, ke la eta infano kiu ĵus naskiĝis, estus bonfaranto de la tuta homaro, bonfaranto bedaŭrinde nekomprenita, ĉar la homoj ne agnoskis la gravecon kaj intereson de internacia lingvo; ili ĉiam rifuzas adopti ĝin sen eĉ klopodi serioze studi la problemon.

Intertempe UNO kaj Eŭropa Unuiĝo elspezas konsiderendajn sumojn poe traduki en multegajn lingvojn tekstojn, dum la adopto de Esperanto solvus la problemon kaj ŝparus milionojn da eŭroj.

Tamen, depost pli ol 100 jaroj la esperantistoj daŭre praktikas esperanton, konvinkitaj pri la praveco de sia ideo.

Kara Ludoviko-Lazaro, en tiu jaro, la esperantistoj ne forgesas vin; ili estas fieraj sekvi vian ekzemplon kaj restas konvinkitaj, kiel vi, ke Esperanto sola povas alporti konvenan solvon al la diverseco de la lingvoj

Albert BESSIERE
(Rouen)

1887 -2000

+++++

Ni baldaŭ eniros en la lastan jaron de la 20a jarcento kaj de la 2a jarmilo. Antaŭ 113 jaroj, estis kreita Esperanto. De tiam, nia lingvo perfektigis. Post Eŭropo, ĝi disvastiĝis en Azion, en Amerikon kaj eĉ en mizeran Afrikon; ĝia literaturo pliriĉiĝis. Eminentaj lingvistoj agnoskis ĝian valoron. Sindonemaj aktivuloj, sen persona profito, energie dediĉis sian liberan tempon por strukturigi movadon ebligantan pozitivan uzadon de la lingvo. Ili verkis literaturaĵojn; ili faris vortarojn; ili tradukis ĉefverkojn el monda kulturo; ili starigis asociojn por interligi samlingvanojn. Ili organizis kongresojn, feriejojn, vojaĝojn kaj multegajn internaciajn renkontiĝojn.

Por tion efektiviĝi, ni ricevis nenian helpon de ŝtato. Male, en kelkaj landoj, esperantistoj estis persekutataj kaj eĉ sendataj al koncentrejoj kaj mortigataj. Grandaj firmaoj, industriaj, petrolaj ne sekrete subvenciis nin: ili preferis subteni politikajn partiojn: *Esperanto alportas nek monon nek potencon. Do ĝi estas senvalora!*

Malgraŭ klopodoj kaj senĉesa propagando (aŭ preferinde: reklamado), multaj homoj ignoras ekziston de Esperanto aŭ konsideras ĝin kiel malnova neseriozaĵo. Aliaj rezignacias al uzado de la lingvo de la plej potenca regno: USono. Ni do devos ankoraŭ longe alfronti skeptikulojn, informi nesciantojn kaj devigi niajn regnestrojn pristudi niajn proponojn por lingva interkompreno. Por tion fari, ni devos grupiĝi ĉirkaŭ niaj lokaj, naciaj kaj tutmondaj asocioj. Tiuj asocioj bezonas helpon de tuta esperantista popolo

En tiu bulteno, vi trovos informojn por aliĝi al asocioj kaj por aboni revuojn. Helpu ilin se vi deziras ke Esperanto prosperu.

Petro KIJŬ

NOTRE ASSOCIATION "ESPERANTO - NORMANDIE"

+++++

L'Union des Esperantistes de Normandie (ou U.N.E. Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj) rassemble les partisans et les utilisateurs de la langue internationale Esperanto demeurant dans notre province. Elle regroupe des gens de bonne volonté desirant de connaître, de correspondre, de visiter, de rencontrer d'autres gens de bonne volonté vivant dans des pays où l'on ne parle pas notre langue nationale.

Les adhérents de notre union ont des opinions politiques, philosophiques, religieuses très diverses mais notre union est absolument neutre et ouverte à tous. Beaucoup d'espérantistes normands sont membres d'associations spécialisées à l'intérieur desquelles ils peuvent rencontrer des gens ayant des activités ou des opinions identiques aux leurs : - professionnelles (cheminots, médecins...);-religieuses (IKUE);- ouvriéristes (SAT-Amikaro et FET)

La plupart sont adhérents de l'Universala Esperanto Asocio et de sa filiale Esperanto-France (U.F.E.-Union Française pour l'Espéranto); cette dernière a une structure fédérale d'où l'existence de la Fédération Normande d'UFE.

Les fondateurs de notre Union ont estimé indispensable de rassembler tous les espérantophones de notre région, - qu'ils soient ou ne soient pas adhérents d'une autre organisation espérantiste. Il en est de même des groupes locaux.

Nous avons besoin d'une organisation régionale pour faire connaître la langue internationale, pour donner des informations à nos adhérents, pour regrouper les isolés, pour aider les groupes locaux, pour établir des relations avec les personnalités (Maires, Députés, Conseillers généraux et régionaux).

Notre outil principal est notre bulletin. C'est une tribune libre; chacun peut l'utiliser en envoyant un communiqué ou un article. Il est cependant demandé de ne pas rédiger d'articles trop engagés qui feraient naître des polémiques.


Certains ont appris l'Espéranto par simple curiosité linguistique mais la plupart souhaitent l'utiliser. Il n'est pas possible de l'utiliser sans s'intégrer dans le mouvement espérantiste. C'est pourquoi, nous répétons que l'adhésion à Esperanto-Normandie (U.N.E.) n'est pas suffisante et nous n'insisterons jamais assez pour que vous souteniez les principales associations à l'échelle nationale et mondiale.

Pierre QUILLAUD

NORMANDA BULTENO

Voici une nouvelle année. Si notre modeste bulletin vous intéresse et si vous désirez continuer à le recevoir, envoyez nous déjà votre abonnement-cotisation. Nous avons été contraints en 1999 de rayer de nos listes des adhérents qui ne répondaient pas à nos appels; certains jetaient même notre bulletin sans le lire. Nos moyens financiers ne nous permettent pas un tel gaspillage. La somme que vous nous adresserez n'est pas seulement destinée au bulletin mais aussi à toutes nos actions de publicité, d'information, de courrier, location de salle etc...

La cotisation normale est de 50 F, mais pour ceux qui règlent déjà une cotisation à un groupe local, elle n'est que de 35 F, à condition qu'elle nous soit transmise par le trésorier du groupe. Evitez nous l'envoi de rappels qui nous font perdre du temps et des timbres-poste.



STAĜO PRI TEATRO EN LA KASTELO GRESILLON

De la 15a ĝis 21a de Aŭgusto 1999, mi gvidis staĝon pri teatro en la Esperanto-Kulturdomo. Partoprenis ĝin deko da personoj. Pro malfacilaĵoj: kontrolo de sekureca komisiono, oni ne rajtis akcepti la staĝanojn por dormi; ili povis sekvi la kursojn kaj manĝi en la kastelo; poste ili loĝis en Baugé, ĉu en hotelo, ĉu ĉe privatuloj (chambre d'hôte)


Ankaŭ matene okazis kurso pri la lingvo kun Christian Rivière. Jeanine Dumoulin parolis teorie pri teatro. La kunordigantino estis Marie-Thérèse Lloancy el Pau kiu sindone dediĉis sian tutan tempon al la organizado kaj ankaŭ kuiris.

Dum la teatra staĝo, venis homoj, aĝantaj de 15 jaroj ĝis pli ol 70. Ili ĉiuj diligente kaj vigle laboris kun mi pri ekzercado kaj provludado de diversaj eroj.

La ĉefa ero estis 2 scenoj el "La kalva kantistino" de Ionesco; poste humuraj rakontoj de Raymond Schwartz kaj 2 skeĉetoj de Bertran Potts. La spektaklo estis sukcesa. Ĝia Sinjorino Jeanine Vincent, kiu antaŭe vivis en Les Andelys, partoprenis la staĝon, paralele al ŝia deĵorado en la oficejo. Tre amuze, ŝi deklamis rakonteton de Schwartz pri "kanoj".

Mi esperas le la prilaboroj baldaŭ komenciĝos por ricevi la agnoskon por la malfermoj de la dormĉambroj, venontjare. Ĉiukaze, okazos denove staĝoj venontjare. Baldaŭ, mi sciigos al vi ĉiuj la programon por jaro 2000. Intertempe, vi povas helpi finance por la prilaboroj sendante ĉekon je ordo de S-ino J. Vincent 26 bis rue de Milngavie 49150 BAUGE
Ĝis Gresillon, venontsomere

Sylvie BONNET
Les Andelys (27)



@@

ESPERANTISTOJ EN LOURDES

La 30an de Aprilo 1999, Katolikaj Esperantistoj bonorde alvenis en la stacidomo de Lourdes kie S-ro J. Morin, kaj alia samideanino bonvenigis ilin kaj gvidis ilin ĝis la hotelo.

Pluvo ĉiam minacis sed feliĉe ne falis dum partopreno en la krucvojo kaj la lumprocesio. Sed pro la pluvo la malfeliĉaj esperantistoj devis ĉeesti la procesion de la malsanuloj interne de la subtera baziliko.

Plej intensa momento estis la prelego de Pastro Girault el Poitiers pri ekumenismo. En tre klara stilo, li prezentis la kialojn de la malunuiĝo de la kristanoj kaj la nunan situacion kie, en ĉiuj eklezioj, oni konscias pri la neceso reveni al unuiĝo. Post la prelego, Pastro Girault afable respondis la demandojn kaj vigla diskutado okazis pri tiu nuntempa problemo.

La kongreso havis internacian etoson. S-ro Ruigrok el Nederlando plene partoprenis la programon kaj faris paroleton en kiu li donis interesajn informojn pri sia lando kaj ties problemoj. Itala kaj Brazilia geesperantistoj kiuj vizitis Lourdes en la kadro de itala grupo eksciis pri la kongreso kaj vizitis ĝin. Ili partoprenis en la vesperkunvenoj kie ili bele kantis por ĉies plezuro.

Dimanĉe, S-roj Morin el Lourdes kaj Fourtané el Tarbes tagmanĝis kun la kongresanoj.

Lunde matene, spite la pluvo, la esperantistoj vizitis la tombon de Pastro Peltier kiu fondis en 1910 la Internacian Katolikan Unuiĝon Esperantistan.

Posttagmeze, la ekskurso al Betharam kaj Pau okazis sub pluvo; tamen ĉiuj estis kontentaj eniri la belegan palacon kie naskiĝis la reĝo Henriko IV. Tie oni admiris Gobelins'ajn kaj flandrajn murtapiŝojn, artaĵojn kaj meblojn, antaŭ ol reveni al Lourdes por ĉeesti la adiaŭan vesperon kaj poste rehejmiĝi.

Albert BESSIERE (Rouen)

KORESPONDADO:

Deziras gekorespondantojn por siaj gelernantoj:

Eugene S. Perevertajlo ab/k 140 Postamt 700 000 TACHKENT OUZBEKISTAN

PARTOPRENU KONGRESOJN DUM JARO 2000

+++++

ESPERANTO-NORMANDIE

L'Assemblée Générale de l'Union des Espérantistes de Normandie aura lieu le Dimanche 2 Avril à Rouen ou à Grand Quevilly.

Des renseignements précis vous seront communiqués dans le bulletin de Mars, mais réservez déjà cette date sur votre agenda.

SAT-AMIKARO

Le congrès de SAT Amikaro aura lieu dans le Pas de Calais à Fouquières -lez-Lens du 22 au 25 Avril. Toutes informations et bulletin d'inscription vous seront fournis en écrivant à Michel Bouchez 66 rue Emile Zola 62740 Fouquières-les Lens

ESPERANTO FRANCE : Le congrès national d'UFE aura lieu comme d'habitude durant les fêtes de Pentecôte mais le lieu n'est pas encore déterminé. Ecrire à Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA: la 73a kongreso de SAT okazos en Moskvo de la 15a ĝis la 23a de Julio 2000 kun antaŭkongreso (10-14 de Julio) en la urbo Vladimir "Koro de la malnova Rusio" kaj postkongreso (24-27 de Julio) en "Moskvo-urbo de la artoj" Vojo al Universala Kongreso: la 24an de Julio ĉiuj dezirantoj povos flugi de Moskvo al Tel Aviv: eblos mendi rabatitan grupan bileton se troviĝos sufiĉa kvanto da petoj. Aligilojn ĉe SAT 67 Avenue Gambetta 75020 Paris

UNIVERSALA KONGRESO: La 85a UK okazos en Tel Aviv (Israelo) de la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto Esperanto France organizas 2 grupvojaĝojn; la 1a dum la periodo de la kongreso; la 2a (de 24a de Julio ĝis 9a de Aŭgusto kun ekskursoj ; la temo estas "Splendeurs d'Israel". Petu aligilon kaj rezervilon al Esperanto France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

ADHEREZ AUX ASSOCIATIONS ESPERANTISTES

ESPERANTO NORMANDIE: Cotisation pour l'année: 50 F Chèque à l'ordre de Union des Espérantistes de Normandie CCP 283-40 H Rouen . Adressez votre chèque à Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

UFE (320F), JEFO(170F), UEA (315 F), TEJO (125F) : Pour ces associations, il existe plusieurs catégories d'adhérents (Membres actifs, simples, couples avec ou sans les revues etc...) Il est donc préférable de contacter Esperanto France et de demander un bulletin d'adhésion

SAT AMIKARO: Cotisation normale avec bulletin :190 F (95 F pour chômeur et jeune jusqu'à 25 ans) Chèque à l'ordre de SAT-Amikaro CCP 37 852 90 L La Source Adressez votre chèque à SAT Amikaro 67 Av. Gambetta 75020 Paris

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA: Cotisation normale avec "Sennaciulo", "Sennacieca revuo" kaj adresaro:310 F Chèque à l'ordre de "SAT-Peranto CCP 17 333 10 N Paris Adressez votre chèque à P.Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

NOVAĴOJ EL CAEN:

Okaze de la nacia kultura manifestacio "Lire en fête", la urbaj bibliotekoj elektis la temon "L'Europe dans tous ses états"(malfacile tradukebla!) kaj montris diversajn aspektojn de landaj kulturoj.

La kvartala biblioteko "Pierre Heuzé" elektis Pollandon. En salono estas ekspoziciitaj grandaj portretoj de polaj eminentuloj, iliaj bibliografioj kaj unu libro pri ili. Ekzemple Copernic, Chopin, Marie Curie, Jean-Paul II, Polanski, Walesa, Czeslaw, ktp...Inter ili, la vizitantoj povas vidi grandan portreton de L.Zamenhof kaj la libron "L'Homme qui a défié Babel" de Centassi et Masson

F.Tailpied (Caen)

En raison de l'assemblée générale des espérantistes de Normandie qui aura lieu le dimanche 2 Avril à Rouen, le prochain bulletin vous sera envoyé vers le 15 Mars. Vous êtes priés de bien vouloir m'adresser vos articles et communiqués au plus tard le 7 Mars.

La estraro de normandaj esperantistoj deziras al ĉiuj legantoj de nia bulteno kaj al ĉiuj membroj de nia unuiĝo

**GOJPLENAN KRISTNASKAN FESTON kaj
MULTE DA FELIĈO DUM LA JARO 2000**



Des gâteaux séparés, bien sûr. Une religieuse au café, un Paris-Brest, deux tartes aux fraises, un mille-feuille. A part pour un ou deux, on sait déjà à qui chacun est destiné - mais quel sera celui-supplément - pour - les - gourmands? On égrène les noms sans hâte. De l'autre côté du comptoir, la vendeuse, la pince à gâteaux à la main, plonge avec soumission vers vos désirs; elle ne manifeste même pas d'impatience quand elle doit changer de carton - le mille-feuille ne tient pas. C'est important ce carton plat, carré, aux bords arrondis, relevés. Il va constituer le socle solide d'un édifice fragile, au destin menacé.

- Ce sera tout !

Alors la vendeuse engloutit le carton plat dans un pyramide de papier rose, bientôt nouée d'un ruban brun. Pendant l'échange de monnaie, on tient l'un la pyramide par en dessous, mais dès la porte du magasin franchie, on le saisit par la ficelle, et on l'écarte un peu du corps. C'est ainsi, comme on tient un pendule. Les gâteaux du dimanche sont à porter comme on tient un pendule. Sourciers des rites minuscules, on avance sans arrogance, ni fausse modestie. Cette espèce de componction, de sérieux de roi mage, n'est-ce pas ridicule? Mais non. Si les trottoirs dominicaux ont goût de flânerie, la pyramide suspendue y est pour quelque chose. - autant que ça et là quelques poireaux dépassant d'un cabas. Paquets de gâteaux à la main, on a la silhouette du Professeur "Tournesol" - celle qu'il faut pour saluer l'effervescence d'après messe et les bouffées de PMU, de café, de tabac. Petits dimanches de famille, petits dimanches d'autrefois, petits dimanches d'aujourd'hui, le temps balance en encensoir au bout d'une ficelle brune. Un peu de crème pâtissière a fait juste une tache en haut de la religieuse au café.

- La dimanĉ-matena kukpakaĵo -

Apartigotaj kukoj, kompreneble. kafkrema kufkuko, PariBrest kuko, du fragotortoj, mil-folipast-kuko. Krom unu aŭ du, oni jam scias kiun, ĉiu el ili estas dediĉita - sed kiu estos tiu (pliakuko de frandemuloj?*) Oni listigas la nomojn senhaste. Aliflanke de la vendotablo, la vendistino, kukprenilo mane reciprokas obeeme viajn dezirojn; ŝi manifestas, eĉ ne impaciencon kiam ŝi devas ŝanĝi kartonon - la folipast-kuko ne lokiĝas. Gravas, tiu plata kartono, kvadrata kun rondigitaj randoj, relevitaj. Ĝi tuj konstituos solidan soklon de rompiĝema konstruo kies destino minacata - Jen la tuto !

Tial la vendistino enabismigas la platan kartonon en piramido de rozkolora papero, baldaŭ nodita per bruna rubando. Dum la moninterŝanĝo; Oni tenas ĝin sube, sed la magazenpordo trairota, oni eltenas ĝin per ŝnureto, kaj oni ĝin iom disigas el la korpon. Tiel estas. La dimanĉkukoj devas esti eltenitaj kvazaŭ oni eltenas pendolon.

Fontistoj de la etetaj ritoj, oni antaŭeniras sen aroganteco nek falsa modesteco. Tiu speco de pentosento, de Trimagaj seriozeco, ĉu ne ridinde ? Nu, ne! Se la dimanĉaj trotuaroj gustas el vagecon, la pendigata piramido pri tio responsas - tiom ke tie kaj tie, kelkaj poreoj superantaj el sako.

Kukpakaĵo mane, oni havas la silueton de profesoro "Tournesol"- kiu endas por saluti postmesan eferveskon kaj la elfetojn de PMU, de kafeo, de tabako. Etaj familiaj dimanĉoj, etaj iamaj dimanĉoj, etaj nunaj dimanĉoj, la tempo pendolas kiel hostimontrilo ĉe la fino de bruna ŝnureto. Iom da kukajkremo faris nur makulon supre de la kafekrema pufkuko.



Ni ridu kune

- Ĉu vi scias kial la fiŝoj ne parolas
- ne, mi ne scias
- vi ŝovu la kapon en la akvon kaj provu ion diri

oni telefonas al urĝa medicina helpo

- Mia filo forglutis skribilon
- atendu, ni baldaŭ alvenos!
- sed kion mi faru ĝis via alveno?
-- skribu per krajono

- Ĉu vi havas pedikojn ?
- jes mi havas !
- kiel vi ilin kuracas
- ili ĉe mi ne malsanas

(eltiritaj de rusa bulteno "komencanto")

Allons voir de près

Un nouveau démarrage dans la Manche


Ne pouvant assurer la mise en place d'un cours d'Espéranto dans le Nord Cotentin, j'ai suggéré à de nouveaux adeptes de se regrouper pour suivre en commun un cours par correspondance.

Le département s'enrichit donc d'un nouveau groupe "ESPERANTO Cotentin", qui s'est créé à Octeville. Le groupe rassemble une douzaine de personnes très intéressées et motivées. L'objectif étant d'étudier un cours en commun et de rédiger les devoirs correspondants

Pdt Esperanto 50 ... Andreo



Voir la presse locale:
Ouest-France et Presse de la Manche



Lasta minuto


De post du monatoj, eblas kontakti la grupon "Esperanto 50" pere de "Interreto". Nia amiko Joelo, klubano kaj lernanto klopodis pri tiu afero antaŭ tri monatoj. Li kreis Ret-servilon kaj poŝtkeston. Por informi vin aŭ por kontakti nin, bonvolu registri la du ret-adresojn ĉi sube:

La Servilo:

<http://perso.libertysurf.fr/esperanto.50>

La poŝtkesto:

esperanto.50@libertysurf.fr



A.Morio<f5am50@yahoo.fr>

Ĉu vi estas akravida ?

	I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII
1	A	N	T	A	O		A	R
2	F		E	M	A			E
3	I		L	O	T	A	D	O
4	K	I	E		O		U	S
5	S		F	I		D	O	T
6	O	N	O			O	N	A
7		E	N	C		N	O	T
8	V	I	O	L	A		N	O

Mi nenion komprenas



Vertikala

I - ĝi povas esti antaŭ aŭ post la radikoj.
II - ne konfesi. III - ĝi povas esti portebla.
IV - dolĉa sento. prefikso de eliro. V - Unuo de elektra potenco. VI - angla longounuo (ak). VII - Kiam ili estas du, tio faras unu(ak). VIII - variigebla rezistilo.

Horizontala

1 - La malo de post.- sufikso de kolekto (s.f.) 2 - rilato al la emo 3 - oni povas perdi aŭ gajni. 4 - pronomo de loko. - beligi (kondit.). 5 - greklitero. - donaco de la edzino (s.f.) 6 - frakcio. - agrabla. 7 - interne - muzikero(sf). 8 - episkopa koloro. - "ne" de la angloj

s.f. = sen finaĵo - ak = akuzativo - kond. = kondicionalo

"ESPERANTO 50"

La unugrada kurso okazos semajne, la merkredo je la 19.00h ĝis la 20.30h, ĉe la Kvartaldomo "la Dole" kaj la monataj kunvenoj, la lastan sabaton je la 17.00h ĝis la 20.00h, ĉe lernejo "Schweitzer"